

203

STEFANO

El la enhavo:

Lančov 50-jara
Milenia arbo en Ostrava
Homonimoj 14
Lastaj militaj tagoj
100 jaroj de HEA
Lingvaj ludoj 10
Enciklopedio Vikipedio
Infandeseĝnaĵoj en Vyškov

2
2002

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



**50 jaroj de Somera Esperanto-Tendaro
en Lančov**
(eldonita poŝkalendareto)

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),

rete Starto: starto@clavis.cz,

www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:**

cea.polnicky@quick.cz (sekretario)

podhradska@volny.cz (prezidanto)

www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio. 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo. 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 250 Kč, B 150 Kč, D 70 Kč, E 70 Kč, F 5000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova@quick.cz

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 02/51817732, m.pluharova@worldonline.cz

Sekcioj de ĈEA: junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj, pri informatiko

Komisionoj de ĈEA: ekzamena, gazetara-informa

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 0324/615651, cea.polnicky@quick.cz

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA:

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047, podhradska@volny.cz (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02/9912201, fakso 02/9912126 chrdle@kava-pech.cz, (eldonado, UEA, subvencioj)

Vicprezidanto: Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj), e-mail: repasyn@iol.cz, tel. 0338/324 287, 0602 800214

Sekretario: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 0324/615651, cea.polnicky@quick.cz (kontakto, membrobazo)

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencioj, seminarioj), tel. 02/20879386

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží 45/25, 736 01 Havířov-Město, tel. 069/6815253, zd.heiser@post.cz (EK)

Komitatano-ĉefdelegito de UEA: Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, 02-22780677

Kontrolgrupo de ĈEA: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef.hron@vakpce.cz, Libuše Hýblová, Bohotín 136, 789 62 Olšany

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690, starto@clavis.cz

Kontrollegis: V. Kočvara, M. Pastrňák, V. Podhradská, P. Polnický

Esperanto-muzeo: Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

Abonoj de gazetoj: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, vlada_hasala@iol.cz

"Milenia Arbo"

La 9-an de aprilo 2002 en Ostrava Poruba okazis solenaĵo omaĝe al la 410-a datreveno de naskiĝo de J. A. Komenský, dum kiu plantis komune lokaj esperantistoj kaj studentoj el gimnazio Olga Havlová mileniajn arbojn (tiliojn) en urba parko.

Tiun ĉi belan aranĝon organizis - dank' al s-ino Lud. Tesařová - la gimnazia direktoro kaj esperantistoj el Ostrava. La solenaĵon partoprenis gravaj eminentuloj kaj organizaĵoj, ekz. reprezentantoj de Urba Ofico Ostrava-Poruba kaj Magistrato de Ostrava, el Domo de Infanoj kaj Junularo, prezidanto de loka organizaĵo de emeritoj, redaktoro de gazeto Deník, Infana Parlamento de la urba kvartalo Poruba, DUHA - arbaraj amikoj, civitana rondo VITA kaj kompreneble reprezentantoj de ĈEA kaj najbaraj EK - Vítkovice, Havířov, Frýdek-Místek, Opava kaj ankaŭ Brno kaj Uh.Hradiště.

La solenon malfermis 30-membra studenta ĥoro, kiu kontribuis al bona etoso de tiu ĉi aranĝo.

Oni plantis du arbojn, la studentoj **La Milenian Arbon** kaj esperantistoj **La Esperanto-Arbon**. La studentoj promesis prizorgi ambaŭ arbojn, por ke ili bone kresku.

Post plantado la partoprenintoj vizitis ekspozicion "El historio de Esperanto en Ostrava", okaze de 50-jariĝo de inaŭguro de Esperanta monumento Jan Aamos Komenský en Ostrava-Zábřeh, kiun komune preparis esperantistoj el Poruba kaj Vítkovice (8.-12.4.2002). Post trarigardo de tre bela ekspozicio okazis babilado kaj estis elektita gasto el plej malproksima loko de Ostrava - venkis s-ro Podepřel el Veverská Bítýška.

Ĉiuj, kiuj partoprenis ambaŭ sukcesajn aranĝojn, certe forveturis hejmen kontentaj.

Fine estas necese al organizantoj gratuli kaj danki por bona reprezentado de Esperanto-movado kaj deziro al ili ankoraŭ multajn sukcesojn en ilia poresperanta laboro.

Věra Podhradská

Rim.: vidu nian filmon, p. 37

Esperanto-Arbo Olomouc

15.5.1932, dum la 5-a kongreso de ĉeĥoslovakaj esperantistoj, en parko Smetana estis plantita Esperanto-Arbo. La solena kunveno omaĝe al la 70-a datreveno okazis la 18-an de majo 2002 ekde la 10-a horo.

50 jaroj de Somera Esperanto-Tendaro 2002

Ni atentigas ĉiujn esperantistojn!

En nia SET 2002 oni ĉijare instruas krom Esperanto ankaŭ lingvojn: la anglan, la germanan, la francan, la rusan kaj la hispanan.

Vi povas aliĝi ankaŭ al la desegnado kaj al la ŝakludo.

La plej malmultekosta estas la kurso de Esperanto!

La geknaboj ĝis 15-jaraj pagas nur 2 300 Kč, la pli aĝaj 2 500 Kč.

La prezo inkluzivas: 40 horojn da instruado, manĝon 5-foje tage kaj ekipitan liton en kabano.

Ĉijare, nun dum la printempo, ni rekonstruas la virinajn necesejojn. Dum la Tendaro ili estos jam ekipitaj per forlava aparato.

En la semajno de la 11-a de aŭgusto ĝis 17-a de aŭgusto oni povas en la kabanoj ripozi sen instruado.

Kvarlita kabano kostas	1 440 Kč
kvinlita kabano	1 800 Kč
Tuttaga manĝo por unu persono	
por la tuta tempo	980 Kč
infanoj ĝis 10-jaraj	700 Kč
duonpenzio: matenmanĝo, la 1-a	

kaj la 2-a vespermanĝoj 540 Kč
litaĵo por la tuta tempo 50 Kč

En la programo estas ankaŭ ekskursoj al Vieno (220 Kč), prömenoj al Hardegg (25 km), Vranov (7 km), Bítov kaj Cornštejn.

Ne forgesu pasporton!

Dimanĉe meze de ĉiu etapo prezentiĝas plej spritaj maskoj en karnavalo kaj samtempe estas elektataj la plej belaj kaj plej simpatiaj tendaranoj. En intertalento oni povas prezenti siajn kapablojn (kanti, deklami, danci) kaj siajn verkojn (ekspozicieto de desegnaĵoj, skulptaĵoj k.s.).

Solena viciĝo

Ni atentigas ĉiujn iamajn partoprenintojn!

La solena viciĝo okaze de 50-jariĝo de Somera Esperanto-Tendaro okazos sabate la 10-an de aŭgusto je la 14-a horo ĉe la flagoj sur la tendarplaco.

Se vi volas aliĝi, faru tion ĝis la 20-a de junio al adreso:

Esperanto, 674 01 Třebíč
tel. aŭ fakso: 0618/841909 - Pavel Sittauer
e-mail: podhradaska@volny.cz



Nia filmo pri Milenia Arbo:

1. Gelernantoj de gimnazio Olga Havlová plantas sian Milenian Arbon
2. Memortabulo de esperantistoj el Ostrava pri ilia Milenia Arbo
3. Esperantistoj el Ostrava plantas sian Milenian Arbon

Nia filmo pri Lančov:

1. SET Lančov en 1965
2. Theodor Kilian instruas
3. Infanoj en la kurso de Theodor Kilian lernas la kanton *En la junulara rond'*, skribitan sur la tabulo

Kion nia asocio povas fari en la plej proksima jardeko?

Kompreneble, ni devas daŭrigi nian ĝisnunan agadon, sed ni klare sentas, ke tio ne sufiĉas, ke nun per la "klasikaj" labormetodoj ne eblas atingi pli, ja eĉ ne tiom, kiom atingis la generacio de Kamaryt. Pumpr. Šupichová, Kilian antaŭ duonjarcento. Necesas trovi novajn aldonajn vojojn.

Studantoj de fremdaj lingvoj kutime ne volas fariĝi propagandistoj nek instruantoj, sed interesiĝas pri tio, kiel ili povos praktike apliki la lingvon post ĝia ellerno. Ili atendas ne nur facilan komunikadon kun eksterlandanoj, sed ankaŭ akiron de multaj utilaj informoj pri ĉio imagebla.

Esperantistoj eldonis dum la pasinta jarcento grandan kvanton de diversaj informiloj, ekzemple pri siaj landoj kaj urboj, sed tiuj jam antaŭ longe malaperis en arkivoj aŭ eĉ en paperkorboj. Nun eblas tiajn informojn instali en la interreto kaj disponigi ilin al la tuta mondo por ĉiam. Nia asocio kapablas enretigi tekstojn eĉ de tiuj membroj, kiuj mem ne havas aliron al interreto nek komputilon.

Ni deziras allogi la junularon. Junaj homoj ĉiam pli prijuĝas gravecon de ĉio ajn laŭ reprezento en la interreto, kiu fakte fariĝas la sesa kontinento de nia planedo - kontinento, en kiu oni povas trovi ĉion: literaturon, popularan muzikon, veteron kun fotoj el satelitoj, elektronikajn vicpartojn, lernolibrojn de lingvoj, fotojn de popularaj personoj,

informojn de registaroj, ministerioj, polico kaj sciencaj institutoj, enciklopediojn, radioelsendojn, televidon, filmojn, ĵurnalojn, gazetojn, reprezentadon de urboj, sortimenton de grandmagazenoj ktp.

Se tiuj informoj estos troveblaj ankaŭ en Esperanto, la signifo de la internacia lingvo kreskos. Se ne, la junularo interesiĝos sole pri la angla. La kalkulado estas simpla. Kaj ĉar ni kapablas tion fari, estas nia devo ne heziti.

Prezentado de nia lando. Unua, la plej facila tasko estas, ke ĉiu landa asocio enretigos informojn pri sia lando (historio, kulturo, scienco, sporto, urboj, vidindaĵoj, gloraj personoj). Turisto antaŭ ekvojaĝo vizitos la retan enciklopedion Vikipedio (vidu paĝojn 48-51) kaj trovos tie esperantlingve bezonatajn informojn pri la koncerna lando kaj urbo. Do ni klopodu, ke post dek jaroj ekzistu en la reto riĉa informaro pri nia ŝtato. Ĉiu el vi povas priskribi sian regionon, urbon, vilaĝon, famulojn, vidindaĵojn (se vi mem ne scias enretigi, nia sekcio de informadiko helpos).

Ĝenerala enciklopedio. La internacia lingvo ne rajtas resti sola kultura lingvo, kiu ne havas sian enciklopedion. En Vikipedio eblas enretigi ankaŭ informojn pri bestoj, maŝinoj, artoj, reĝoj, diversaj objektoj, simple pri ĉio, kio kutime troveblas en enciklopedioj. Ĉiu povas kontribui laŭ siaj hobiaj kaj interesoj. Tute ne gravas, ke vi agos nesisteme, la enciklopedio mem ĉion sistemigos.

Esperanta enciklopedio. La fama enci-klopedio pri Esperanto-movado aperis en 1935 en Budapeŝto, poste ĝia represo en 1986. Sed ekde 1935 realiĝis miloj da novaj faktoj, famiĝis novaj personoj, verkoj, asocioj kaj institutoj. Estas plej urĝa tempo aktualigi la enciklopedion. Plej facile kaj rapide - ĉiu landa asocio prilaboru sian movadon kaj enmetu en la komunan enciklopedion (denove Viki-pedio).

Vortprovizo. Kvankam oni multe plendas, ke la faka lingvo en Esperanto estas subevoluinta, tamen necesas konfesi, ke niaj Esperantaj-nacilingvaj (kaj inversaj) vortaroj ankoraŭ ne prilaboris ĉiujn terminojn, kiuj jam en la mondo aperis. Niaj antaŭuloj ne havis komputilojn, nek ŝancon publikigi ampleksajn vortarojn, tial ili eĉ ne penis la vortprovizon prilabori. Sekve ordinara esperantisto trovas en sia vortaro nur parton de Esperanto, dum la alia parto restas por li kaŝita, kvazaŭ ĝi ne ekzistus. Komputila prilaboro estas pli facila kaj reta publikigo preskaŭ senpaga. Senĉesa disvolvado de niaj vortaroj estas tute reala.

Literaturo. La *eLibrejo* kaj *Virtuala Esperanto-Biblioteko* jam nun liveras en la reto grandan kvanton de literaturaĵoj, originalaj kaj tradukitaj, kaj ĉiutage la oferto kreskas. Ankaŭ niaj verkoj tie aperas.

Nacilingvaj informoj pri Esperanto. Apud paperaj informiloj, kiujn oni ku-

time enkorbigas aŭ netroveble enŝrankigas, ekzistas facile troveblaj informaroj en la reto. Sufiĉas uzi kiel adreson la vorton **esperanto** kun punkto kaj ŝtata simbolo, kaj tuj antaŭ viaj okuloj aperos paĝo pri Esperanto-movado en tiu lando (www.esperanto.cz - Ĉeĥio, www.esperanto.sk - Slovakio, www.esperanto.de - Germanio ktp.). Informoj en la paĝo povas esti en Esperanto, nacia lingvo aŭ pluraj lingvoj (kutime la vizitanto povas elekti laŭ sia plaĉo). Dependas nur de ni mem, kiel ni prezentos nian lingvon kaj movadon antaŭ niaj samnacionoj. Tie povas esti prezentitaj niaj kluboj, nia literaturo, ankaŭ niaj eminentuloj, interlingvistiko ĝenerale, esperantologio speciale ktp.

Presa publikigo. Tekstojn, liveritajn al interreto, ni povas ankaŭ publikigi libroforme. La reto do estas kolektejo de materialoj, kiujn lerta redaktoro povas utiligi por klasikaj presaĵoj. La reto ne signifas rezignon pri la malnovaj labormetodoj, sed ebligas konservon de iliaj rezultoj por la futuro, sistemigon kaj disponigon por la tuta mondo. Eĉ fotojn, filmojn, voĉojn eblas konservi kaj publikigi. Kio normale pasus aŭ restus kaŝita en libroŝrankoj, fariĝas daŭre atingebla same el Japanio aŭ Afriko kiel el ĉeĥa vilaĝeto.

Konkludo. Post kelkaj jaroj povas en la reto elkreski sistemo de esperantlingva informaro kaj kulturo, je kiuj povos sin apogi nia varbado.

Miroslav Malovec

55-a Kongreso de I.K.U.E. en Kroměříž

La katolika sekcio de ĈEA kore invitas al partopreno de la 55-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, okazonta en la tagoj de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2002 en urbo Kroměříž, ne nur la katolikajn esperantistojn, sed ankaŭ simpatiantojn de la katolika E-movado. Pluajn informojn kaj aliĝilojn disponigos al vi IKUE--Katolická sekce ĈES, Miloslav Šváček, Tršická ul. 6, 751 27 Penčice aŭ perrete:

msvacek@iol.cz

Renkonto de la katolika sekcio en Želiv

La katolika sekcio de ĈEA aranĝos en la tagoj de la 27-a ĝis la 29-a de septembro 2002 semajnfinan renkonton en Želiv. Kore invitataj estas ne nur la membroj de la sekcio, sed ĉiuj, kiuj deziras travivi tri belajn tagojn en amikeca medio. La kotizo, inkluzivanta loĝadon kaj tuttagan manĝadon por unu tago, estas 200 kronoj, do entute 600 kronoj, pagotaj surloke. Bv. vin aligi ĉe adreso: IKUE--Katolická sekce ĈES, Miloslav Šváček, Tršická ul. 6, 751 27 Penčice aŭ perrete: msvacek@iol.cz. Volonte ni disponigos al vi pluajn informojn.

11-a Refreŝiga E-tendaro Nekvasovy

de la 11-a (dimanĉo) ĝis la 21-a (merkredo) de aŭgusto 2002 (sed eblas ankaŭ malpli longa tempo).

La pentrinda vilaĝeto Nekvasovy situas inter Nepomuk kaj Pačejov ĉe la trako 190 Plzeň-České Budějovice. En la arbarriĉa regiono kontentigos ŝiajn hobi-ojn turistoj kaj fungoserĉantoj, eblas ankaŭ viziti proksiman naĝejon. La ĉirkaŭaĵo estas sen industrio kaj sen ĉefaj aŭtostradoj, pura kaj trankvila.

Loĝado en turisma tranoktejo ĉerande de la vilaĝo ĉ. 30 minutojn piede de la trajno. Ĉambroj 6- kaj 7-litaj, necesejoj, banejoj kun varmakvaj duŝoj, societa saloneto, sportejoj, naĝejo. En la vilaĝo nutraj-vendejo kaj poŝto.

Programo:

- turismaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo
- sportaj ludoj kaj konkursoj
- instruado de Esperanto (nedevice)
- rondetoj de Esperanta konversacio kaj lingvaj ludoj
- komuna gimnastikado, joko
- individua refreŝigado, naĝado ktp.

Prezj:

por la unua tago:

157 Kč - 199 SK

por ĉiu sekva tago:

152 Kč - 189 SK

Aliĝilojn sendu al:

Klub Esperanto Plzeň
Jiří Vomáčka - předseda
Koterovská 30
CZ-326 00 Plzeň

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature

14

Josef Kavka

-OR-

Ĉi-okaze temas pri pseŭdosufiksoido, do radikparto. Laŭ PAG (1980, 477), Migliorini eĉ proponis fari el -OR-sufiksoidon kun la senco: maŝino. En tiu ĉi propono ni vidus apenaŭ iun avantaĝon por la Eo-leksiko (1984, 1986). Ideon similan al tiu de Migliorini havis ankaŭ pliaj terminologoj, sed ni ne ŝarĝu la kadron de jena konsiderado per tro multe da referencoj. Memkomprene ni estus tre distancaj de timo antaŭ homonimeco, se tamen oni trudus -OR-kiel sufiksoidon, negrave kun ajna signifo. Fine meritas aludon, ke -OR- mem estas fundamenta radikoj, la nomo de la ĥemia elemento. Eble oni emus rideti pro koncernaj homonim-okazoj, sed kiam estis akre disputate pri komput-IL-o aŭ -OR-o, unu el gravaj argumentoj kontraŭ komputoro figuris la timo, ke komputoro povus signifi salajron por komputado. La aŭtoron, kiu estis subjekto de tiu-ĉi homonim-fobio, ni prefere ne nomu, por ne denove lin embarasi. (Kvankam ne estus probable, ke li legus niajn liniojn).

Okupante nin pri -OR-vortoj, ni ja inkludu ankaŭ la -ATOR- (PAG, 477) kaj -ADOR- (EB, 1988, 676) vortojn. En la unuaj aperas krome la homonimeco

particip-sufiksa, en la duaj ag-sufiksa, eĉ apart-radika, nome pro la fundamenta verbo: adori.

Antaŭ ol elnombri la unuopajn vortojn, estu al ni permesate apliki jenajn mallongigojn: f = fundamenta, z = zamenhofa, o = oficiala, n = neoficiala.

Kadre de la **fundamentaĵoj**, ni eltrovis jenajn:

1. aŭtoro. Ĉu laŭ la plej supre menciita propono ĝi signifas ankaŭ maŝinon por fabriki aŭtojn? Ĉu laŭ la kunmet-interpreto ĝi signifas eĉ prezon de la veturilo? Certe, plu ni rezignu pri tiaspecaj ŝercaĵoj.

2. doktoro: dokta = klerega (n)

3. doloro; dolo = jursciencia termino (n)

4. humoro; humo (z)

5. kantoro; kanti (f)

6. kaporo; kapo (f). Anstataŭ "kaporo", nomenklature pli taŭga estus kaparido (*Capparis*), familio kaparidacoj (*Capparidaceae*).

7. kastoro; kasto (o)

8. koloro; kolo (f)

9. kontoro; konto (o)

10. laboro; labo (n)

11. likvoro; likva (n)

12. memoro; mem (f)

13. odoro; odo (o)

14. pulvoro; pulvo (f)

15. putoro; puto (f). Nomenklature pli taŭga ol "putoro" estus putorio aŭ mustelo putoria (*Mustela putorius*)

16. redaktoro; tutcerte ne maŝino por redakti (o)

17. sonori; soni (f)



18. tajloro; tajli (n)
 19. valoro; valo (f).
 Kvankam ne fundamentaj, tamen
 zamenhofaj estas
 20. aŭroro; aŭro (n)
 21. numeratoro; numero (f).

Sekvu la oficialaĵoj:

22. aktoro; akto (o)
 23. aligatoro: ĉu al-ig-at-oro? (*Alligator*)
 24. amatoro; ami (f)
 25. ambasadoro; ambasado (n)
 26. diktatoro; dikti (f)
 27. direktoro; direkti (f)
 28. Ekvadoro; ekvo (n)
 29. ekvatoro; same
 30. furoro; furo (n)
 31. inspektoro; inspekti (o)
 32. konduktoro; kondukti (n)
 33. kreditoro; kredi (f), kredito (o)
 34. majoro; majo (f)
 35. matadoro; mato (f, n)
 36. mentoro; mento (f)
 37. meteoro; meteo? (n)
 38. motoro; moto (z)
 39. oratoro; oro (f)
 40. radiatoro; radio (f)
 41. retoro; reto (f)
 42. rigoro; rigi (z), Rigo (n)
 43. sektoro; sekto (o)
 44. tenoro; teni (f)
 45. teroro; tero (f)
 46. toreadoro; torsi (n)
 47. traktoro; trakti (f).

Kaj la neoficialaĵoj:

48. agoro; agi (f)
 49. akumulatoro; akumuli (n)
 50. amoro; ami (f)
 51. Andoroj; Andoj (n)
 52. aŭditoro; aŭdi (f)



53. debitoro; debito (z)
 54. dekororo; dek (f), koro (f)
 55. depresoro; presi (f)
 56. detektoro; detekti (n)
 57. devoro; devi (f), vori (n)
 58. dilatatoro; dilati (n)
 59. ekscitatoro; eksciti (f)
 60. ekstensoro; ekstensi (n)
 61. fazoro; fazo (o)
 62. fetoro; feti (n)
 63. fleksoro; fleksi (f)
 64. fluoro; flui (f)
 65. fulgoro (*Fulgora*); fulgo (f)
 66. generatoro; generi (n)
 67. Gregoro; grego (o)
 68. hororo; horo (f)
 69. induktoro; indukti (o)
 70. injektoro; injekti (z)
 71. komodoro; komodo (f)
 72. Komoroj; komo (f)
 73. kompresoro; kompreso (f)
 74. kondensatoro; kondensi (n)
 75. kondensoro; same
 76. kontaktoro; kontakto (o)
 77. konvertoro; konverti (f)
 78. Luksoro; lukso (f, n)
 79. masoro; maso (f)
 80. minora; mino (f, n)
 81. mukoro (*Mucor*, *Phycomycetes*,
Mycophyta); muko (f)
 82. nestoro; nesto (f)
 83. Pandora; pando (n)
 84. pastoro; pasto (f)
 85. piloro; pilo (o)
 86. pletoro; pleto (f)
 87. poliporo (*Polyporus*), poliporacoj
 (*Polyporaceae*); polipo (o)
 88. pretoro; preta (f)

89. produktoro; produkti (f)
 90. prokuratoro; prokuri (z)
 91. prokuroro; same
 92. prospektoro; prospekto (o)
 93. pudoro; pudo (z)
 94. reflektoro; reflekti (z)
 95. reformatoro; formo (f)
 96. refraktoro; refrakti (n)
 97. regulatoro; regulo (f)
 98. rekvizitoro; rekvizito (z)
 99. repetitoro; peti (f)
 100. rotatoro; roto (f)
 101. rotoro; same
 102. rumoro; rumo (f)
 103. Salvadoro; salvo (o)
 104. saporo; sapo (f)
 105. sensora; senso (n)
 106. soforo (*Sophora*),
 fabacoj (*Fabaceae*); sofo (f)
 107. spektatoro; spekti (n)
 108. statoro; stato (f)
 109. stuporo; stupo (f)
 110. tensoro; tenso (n)
 111. Timoro; timi (f)
 112. toporo; topo (n)
 113. transformatoro; formo (f)



En PIVS (1987) ni trovas:

114. kolektoro; kolekti (f)
 115. komputoro; komputi (n)
 116. kursoro; kurso (o)
 117. procesoro; proceso (f)
 118. pikadoro; piki (f)

Fine en EB (1988, 676):

119. -ador-. Tiun lanĉis Eichholz, en kies Slipara Vortaro eblas legi: "Teknika sufikso indikanta neaŭtonoman konstru-maŝinon, kiu estas daŭre regata de homo." La inventinto eksplikas: "Mi proponas tiun ĉi novan sufikson, por ke

oni povu distingi tiujn 'adorojn' de 'atoroj', do de maŝinoj, kiuj pli-malpli aŭtomate fun-kiias, ekz. levatoro, asfalt-sekigatoro, oleo-bruligatoro?

120. kaliforo (*Calliphora*), familio kaliforedoj (*Calliphoridae*), ordo dipteroj (*Diptera*); kalifo (o).

Nun ni provu, laŭ la koncernaj kategorioj, koncize statistiki nian -OR-vortaron: Se ni neglektas la okazojn, kiuj evidente havas nenion komunan kun la latinidaj sufiksoj -OR(E), -EUR, -ER

(ekz. 6, 15, 48, 51, 57, 83, 106, 120),

ni konstatas, ke por iloj (maŝinoj, aparatoj k.s.) restas 38, 40, 47, 49,

56, 58, 59, 66, 69, 70, 73, 74, 75, 76,

77, 79, 94, 96, 97, 100, 101, 108,

112, 113, 114, 115, 117, 119, t.e. 28 okazoj (23%). El ili 40, 49, 58, 59,

66, 74, 97, 100, 113, t.e. 9 okazoj

(7,5%) estas la -ATOR-oj. Por la

kategorio de persona aganto servas 1, 2,

5, 16, 18, 22, 24, 25, 26, 27, 31, 33, 34,

35, 36, 39, 41, 46, 52, 53, 67, 71, 82, 84,

88, 89, 90, 91, 92, 95, 98, 99, 107, 118,

t.e. 34 vortoj (29%). Jam tiu ĉi fakto malpledas por intenco, rezervi eventualan -OR-sufikson al maŝinoj. Inter niaj 34 vortoj ni trovas same -ATOR-ojn: 24, 26,

39, 90, 95, 107, eĉ -ADOR-ojn: 25, 35,

46, 118.

Por la ceteraj plej diversaj nocioj, ĉu konkretaj, ĉu abstraktaj, restas do pli ol duono da vortoj de ni registritaj.

Memkomprene, ni flankenlasis la vortojn, kiujn ne eblas derivi de Eo-radikojn, do akuzi pro "homonim-danĝero", ekz. profesoro (ĉar ne ekzistas "profeso") aŭ inhibitoro (ĉar ne ekzistas "inhibiti").

Resume: Ĉu ne estus prudente, almenaŭ provizore, el taktika vidpunkto (1984), rezigni pri lanĉado de novaj sufiksoj, ekz. -OR-, -ATOR-, -ADOR- kaj preferi akceptadon de internacie normigitaj, bone kompreneblaj por terminologo kaj nomenklaturisto, terminoj?

Fontoj

- *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970). - Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris.
- *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto (1980), K. Kalocsay - G. Waringhien. Kvara, tralaborita, eldono. - Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam.
- *Kioma ŝanco por Esperanto-afiksoj en scienca terminologio? (1984), J. Kavka. Kolekto de referaĵoj el la internacia seminario APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO, 140-151. - Ĉeĥa Esperanto-Asocio, scienca-teĥnika sekcio. Brno.
- *Pri nove proponataj afiksoj el la vidpunkto taktika (1986). J. Kavka. - SCIENCA REVUO, 37, 43-49. Pizo.
- *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987). - Sennacieca Asocio Tutmonda. Paris.
- *Esperanto Bildvortaro (1988), R. Eichholz. - Esperanto-Press, Bailieboro.
- *Inversa Vortaro de Esperanto (1989), B. Pabst. - Esperanto-Centro, Paderborno.

KAEST 2002

8.-10. 11. 2002

Elektronikaj rimedoj



Detaloj aperis en Starto 1/2002, p. 25.

ATENTON - ŜANĜO !!!

La 10-a ĈEA-kongreso okazos

15.-17.11.2002

(en la origina dato Prago gastigos
kunsidon de NATO, kiun certe
akompanos amasaj kaj danĝeraj
protestoj)

POZOR - ZMĚNA !!!

Historio de la lastaj militaj tagoj 1945

Se vi atendas, ke mia hodiaŭa rakontado havos ian literaturan formon, ke tio estos ia beletraĵo, vi estos seniluziigitaj. Ĝi estos simpla, eĉ kruda rakontado, kiel kruda povas esti milito kaj en nia kazo ankaŭ la lastaj militaj tagoj, pri kiuj mi volas nun rakonti laŭ mia propra taglibro (ĉeĥlingva), kiun mi skribis en la tempo de la 12-a ĝis 26-a de aprilo 1945.

Aprilo 1945 en Brno:

12-a: post la 9-a horo antaŭtagmeze granda flugatako kontraŭ nia urbo sen alarmo. Multaj mortigitoj. Eble 30 homoj pereis en flamoj en veturanta tramo sur strato Husova. Cie jam komenciĝas haoso.

13-a: Eskcitiĝo kreskas. Nia domo, pli bone dirite ĝiaj loĝantoj, okupiĝas pri konstruado de bombŝirma kelo. Ĉiuj komune laboras. Certaj alportas argilon kaj sablon el la ĝardeno kaj aliaj masonfermas fenestrojn. Danĝero minacas same al ĉiuj, tion konscias ĉiuj, tial ĉiuj helpas laŭ sia povo.

14-a: En la oficejo oni bruligas ĉiujn "suspektindajn" planojn. Kaj hejme oni finas laborojn kunligitajn kun blokado de kelaj fenestroj.

Vespere jam ĉiu sola aranĝis sian propran kelon.

15-a: Hodiaŭ ni ĉiuj komuniĝis, ĉar nun ni jam laŭvere ne scias, kiu tago kaj horo povas esti nia lasta. Estas la 4-a posttagmeze kaj ni jam estis sesfoje en la bombŝirma kelo. Videblas, ke ni baldaŭ devos translokiĝi tien definitive.

16-a: Laŭ la ŝtuparo supren kaj denove malsupren kaj ree supren. Tio estas nia nuna taga kaj nokta okupo. La nokto estis sovaĝa. La suda parto de la firmamento estis vualita de ruĝa brilo de brulego de la fabriko Hecht. Ni iom ekdormis nur antaŭ la mateno, ĉar intervalo inter plua aviadila alarmo estis ĉi-foje kelkhora. Ankaŭ en la tuta tago kun pli longaj aŭ malpli longaj paŭzoj estas alarmoj. Ĉirkaŭ la tagmezo bombardado de malalta flugo. Du grandaj incendioj ĵetis sur klare bluan firmamenton densan grizan fum nubon. Sed kio nun estis trafita, neniu scias tutcerte, ĉar ĉe tia situacio, kiu nun estas, neniu emas malproksimiĝi el la hejmo.

17-a: Kaj denove bombardado. Cirkulas famoj, ke oni traktas pri proklamo, ke Brno estu proklamita malferma urbo. Lastatempe malplenaj stratoj subite reviviĝas.

Homgrupoj, ĉiuj atendas, ĉiu esperas ... Germanaj oficejoj translokiĝas.

18-a: Nokto denove travivita en la kelo. Iu alportis sciigon, ke Brno estas ja fortikaĵo, ke ĉiuj germanoj devos forloĝiĝi, el la ceteraj, kiu volas. Poste tio estis negita, tamen germanoj forloĝiĝas. Tutaj karavanoj treniĝas al siaj pozicioj. Homoj klopodas havigi al si panon. Preskaŭ nenie oni ĝin bakis. Tamen ni sukcesis prizorgi ĝin post sufiĉe longa vicitendo.

Dum la atendo ni vidis, ke germanaj soldatoj forprenas biciklojn de civiluloj kaj minacas per armiloj, kiam la homoj ne volas ilin transdoni... Morgaŭ laŭdire ekdeĵoros Volksturm. En germanaj informoj estis anoncite, ke rusa atako estis haltigita apud Židlochovice, sed la homoj parolas pri io alia.

19-a: Antaŭtagmeze oni eksplodigas konstruaĵojn gravajn por la milito. Certajn tutajn stratojn oni devas evakui. Pafado, bombardado, detonacioj. Kvar brulegoj proksime de la stacidomo.

20-a: Preskaŭ ĉiuj vendejoj estas fermitaj. Ni manĝas, kion ni havas el la pasinta tempo. Forte estas bombardita la strato Cejl. Laŭdire, ĝi aspektas tie tre malbone. Mortintojn neniu elruinigas. La urbo estas

preskaŭ senhoma. Ĉiu restas en sia kelo aŭ en la plej proksima ĉirkaŭaĵo. Ie oni konstruas jam barikadojn. Jam la duan tagon ne funkcias gaso. Elektra kurento ankoraŭ ne estas liverata kaj eĉ la netrinkebla akvo ne fluas.

21-a: Tumulta nokto same kiel la tago. Pafoj, ke la fenestroj tremas.

22-a: Komence ŝajnis, ke Brno estos baldaŭ okupita, sed nun jam pasos preskaŭ semajno de nia subtera vivo, kaj antaŭsignojn de tio oni ne vidas.

23-a: Denove granda bombardado. Post kelkaj pafoj estingiĝis ĉie lumo, kiu ĝis tiam lumis. Malhelo, kaj barelsonado de falintaj pereoportaj bomboj. Kiom denove tio estas subite finitaj homvivoj. Morto, doloro, ploro estas dominantaj elementoj de malĝoja hodiaŭo. Estas malgaje sen lumo kaj malvarme sen varma spiro de la suno. Oni iradas kvazaŭ sen kapo, preskaŭ laŭvorte de nenio al nenio. - Grandaj aviadilbataloj super la urbo.

24-a: Ĉi-nokte estis unuafoje trafita nia ĉirkaŭaĵo. La fenestroj estas frakasitaj. Preskaŭ nenio estas nun aĉetebla. Almenaŭ, ke panon ni post pli ol duonhora atendo ricevis. Sed kiel longe ...

Ni vere estas jam kiel insulo en vasta maro, fortranĉita de la mondo.

Ĉar ne funkcias elektra kurento, silentas ankaŭ radio. Neniu pruvita informo, naskiĝas sovaĝaj famoj.

25-a: Ĉirkaŭ la 10-a ni travivas terurajn momentojn. Granda bombardado de nia proksima ĉirkaŭaĵo. Nia tuta domo tremas. Proksime brulas kelkaj konstruaĵoj.

26-a: Teruro de la tago sekvas en la nokto. Kontraŭstaranta domo estas trafita. Incendio en kontraŭa lignostokejo feliĉe ne disvastiĝis. En la loĝejoj de nia domo estas trarompitaj fenestroj kun kadroj, meblaro ruinigita. Nokto terura, kaj la tago ne aspektas pli bone. Surstrataj bataĵoj. Ni aŭdas ĝis la kelo rimarkeble ankaŭ pafojn el pafiloj. Proksimume duonhoron antaŭ la 11-a la unuaj tankoj kaj rusaj soldatoj en nia strato. Ili instigas niajn homojn iri kun ili sur barikadojn. Ankoraŭ estas aŭdebla pafado. Eble en la parko Lužánky estas interpafadoj. La homoj staras antaŭ la domoj, morna humoro liberiĝis, sed la rusaj soldatoj admonas, ke la homoj kaŝu sin, ke estos ankoraŭ pafado. Ĉiuj homoj ĝojmienas kaj plezuriĝas. Angoro, timo kaj doloro kvazaŭ subite fuĝas. Fine venis tago tiel longe atendata. *Marta Lorková*

Ni estas du knaboj, komencantoj. Ni kontribuas per tiu tre facila artikolo:

Avantaĝo de Esperanto

Amikino de nia pli aĝa amiko havas sur sia pulovero iajn signojn. Ili aspektas kiel ĉinaj. Neniu scias ĉe ni, kion ili signifas. Nia amiko fotis ilin kaj sendis fotojn per e-majlo al amikoj al Japanio kaj Ĉinio. Baldaŭ li ricevis respondon. Respondo estis interesa. Signoj estis ĉinaj. Signifis: stelo, vojo, amikeco kaj denove stelo.



Sed, du signoj, kiel skribis ĉiuj respondintoj, estis renverse fuŝe bilditaj. Certe fabrikantoj pensis, ke en Ĉeĥio ni ne komprenos eraron. Ili ne pensis, ke esperantaj komencantoj povas malkovri fuŝaĵon.

Salutas vin Jaromír el Dolní Bousov kaj Tomáš el Březno.

Esperanta enciklopedio

Ekde novembro 2001 kreskas en la interreto esperantlingva enciklopedio Vikipedio (<http://eo.wikipedia.com>), kiu estas varianto de la retaj enciklopedioj Wikipedia en 22 aliaj lingvoj. Jam ĝi havas pli ol 2000 artikolojn kaj ĉiutage kreskas. Kontribui povas ĉiu el vi per kiu ajn artikolo de enciklopedia karak-tero, ekzemple pri eminentaj personoj, pri urboj kaj iliaj memorajoj, pri hobiaj, bestoj, floroj kaj aliaj temoj, kiuj taŭgas por ĝenerala enciklopedio. Esperanto ne rajtas resti sola kultura lingvo, al kiu mankas tia enciklopedio, se ĝi volas ludi internacian rolon.

Mi kontribuis per kelkaj niaj verkistoj (Komenio, Hašek, Havel, Ĉapek, Hrabal, Jirásek, Vančura, Zeyer ktp.), per niaj Esperantaj tradukistoj (Hromada, Kořínek, Lukáš, Pumpr) kaj per kelkaj niaj urboj (ekz. Karlovy Vary). Danki mi devas al s-ino Alena Klementová, kiu sendis al mi multajn tekstojn, kiujn mi ankoraŭ ne sukcesis ĉiujn prilabori, sed paŝon post paŝo mi ilin enmetas en la enciklopedion. Mi volonte akceptos ankaŭ aliajn tekstojn (se eble, en elektronika formo, per elektronika poŝto aŭ sur diskedo). La artikoloj devas esti viaj propraj, ne tradukoj, ĉe kiuj ni povus konflikti kun


la aŭtoraj rajtoj.

La enmeto estas relative facila. Sur ĉiu paĝo de la enciklopedio vi trovos malsupre substrekitan frazon Redaktu tekston de la paĝo. Kiam vi alklakos ĝin, la tuta teksto de la paĝo aperos en fenestro, en kiu vi povas fari ŝanĝojn kaj aldonojn. Sed ĉar ne estas ĝentile ŝanĝi fremdan tekston, estas rekomen- dinde nur aldonadi. Vi ekzemple volas aldoni artikolon pri nia komponisto Antonín Dvořák. Vi devas trovi unue la paĝon pri muziko kaj malfermi la fenestron. Antaŭ vi aperos difino de la muziko kaj muzikaj ĝenroj, sed poste

estas ankaŭ loko kun nomoj de famaj komponistoj (Bach, Mozart ktp.). Al ili vi devas aldoni la nomon de nia komponisto, sed **sen supersignoj** kaj la familian nomon per majuskloj, kaj enfermi ĝin per duoblaj kvadrataj krampoj [[Antonin

DVORAK]]. Malsupre sub la fenestro alklaku Konservu kaj la fenestro fermiĝos. Inter la komponistoj aperos nomo Antonin DVORAK? kun substrekita demanssigno. Tio signifas, ke artikolo kun tia titolo ankoraŭ ne ekzistas en la enciklopedio.

Nun sufiĉas alklaki la demand- signon kaj aperos nova paĝo titolita Antonin DVORAK kaj kun malfermita fenestro, en kiun vi povas skribi vian tekston aŭ enmeti tekston antaŭ- preparitan.



WIKIPEDIO
La Libera Enciklopedio

Uzu X-sistemon (ux, cx, sx, hx, jx, gx), la maŝino mem scias transformi ilin al ĉapelitaj literoj (kiam vi supre klakos al Uzu Unikodon). Inter alineoj vi povas ellasi linion, sed ĉiam komencu de la maldekstra rando, ne uzu tabelilon, alie la teksto ne aperos bone. Antaŭ ol klaki Konservu estas bone klaki Antaŭrigardu por vidi, ĉu la teksto aperas tiel, kiel vi deziris. Nur poste klaku Konservu, la paĝo fermiĝos kaj la komponisto aperos substrekita, sen demandsigno: Antonin DVORAK.

Se vi volas, ke la ligo al Dvořák aperu ankaŭ sur la paĝo Kompleta listo de artikoloj, vi devas redakti ankaŭ tiun paĝon kaj enmeti tien [[Antonin DVORAK]]. La maŝino mem trovos, ke la artikolo jam ekzistas, kaj post fermo de la fenestro aŭtomate la nomon **substrekos**.

Kion vi ĉirkaŭos en la fenestro per tri apostrofoj ("dika skribo"), tio poste aperos kiel **dika skribo**, dum du apostrofoj ("kursivo") estas por *kursivo*. Ne forgesu ĉe ĉeĥaj personoj kaj urboj la vorton "ĉeĥa": ĉeĥa komponisto, ĉeĥa urbo aŭ Ostrava (Ĉeĥio).

Miroslav Malovec



410-a naskiĝdatreveno de Instruisto de Nacioj

La 28-an de marto 2002 pasis la 410-a naskiĝdatreveno de Komenio, kiu ĉiam emfazadis signifon de ekzemploj. Mi uzos artikolon pri li por demonstri al nesper-tuloj, kiel aspektas tekstoj en la interreto kaj konkrete en Vikipedio.

En la teksto vi povas vidi multajn vortojn substrekita - tio signifas, ke jam ekzistas pri ili artikolo en la enciklopedio (ekz. Ĉeĥio, 1592, 17-a jarcento, universitatoj, protestantismo, Eŭropo, la latina, matematiko). Sufiĉas alklaki iun el tiuj vortoj kaj tuj antaŭ viaj okuloj fermiĝos la paĝo pri Komenio kaj



malfermiĝos paĝo ekz. pri matematiko.


Sed estas tie ankaŭ multaj vortoj, kiujn sekvas substrekita demandsigno (ekz. Nivnice?, muzeo?, 1620?). Pri ĉi tiuj vortoj aŭ datoj ankoraŭ ne ekzistas artikolo en la enciklopedio, sed estus konvene ĝin verki. Se vi klakos al iu el la demandsignoj, malfermiĝos antaŭ vi malplena paĝo titolita laŭ la vorto antaŭ la demandsigno kaj vi povas enmeti la koncernan artikolon, ekz. pri la dato 1620. Poste tra la tuta enciklopedio ĉiuj mencioj pri la jaro 1620 aperos substrekita por montri, ke pri la dato jam ekzistas artikolo.

Miroslav Malovec

Johano Amoso KOMENIO

Hejmpaĝo | Lastaj Ŝanĝoj | Preferoj | Uzu X-Sistemon

Johano Amoso KOMENIO (ĉeĥe Jan Amos Komenský, latine Comenius, legu Komenius, 1592-1670) naskiĝis la [28-an de marto]? 1592 en urbeto Nivfiĉe? apud urbo [Uherský Brod]? (Sudmoravia regiono, Ĉeĥio), mortis la [15-an de novembro]? 1670? en Amsterdamo? kaj estas entombigita en Naarden?, kie troviĝas lia muzeo?. Elstara ĉeĥa filozofo?, fondinto de la moderna pedagogio? ("instruisto de la nacioj"), ĉefa reprezentanto de la ĉeĥa kulturo? en la 17-a jarcento. Post la studoj ĉe la universitatoj en Herborn? kaj Heidelberg? li vivis dum kelkaj jaroj en la moravia urbo Přerov? (legu Prjerov) (1614-1617) kiel instruisto de la "Unuiĝo de Fratoj" (husana eklezio) kaj pli poste kiel pastoro en Fulnek? (1618-1621). Post la jaro 1620?, kiam estis venkita la bohema protestantismo. Komenio devis kun miloj da samkonfesiuloj forlasi sian patrujon. Antaŭ la ekzilo en kaŝejoj (Brandýs nad Orlicí, 1622-1628) li verkis ĉeĥlingve amaran satiron Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro. Kiel ekzilito li vivis en Lešno?, la tiam pola sidejo de la Unuiĝo (1628-1656), kies lasta episkopo li estis elektita en 1648, intertempe restadis en Britio (1641?-1642), Svedio (1642-1648?), en la teritorio de la hodiaŭa Slovakio (1650-1654?) kaj fine en Nederlando (1656-1670?), kie li estas entombigita. Al tiuj ĉi landoj, precipe al Svedio, li estis invitita por reformi tie la lernejaron kaj la publikan vivon laŭ siaj proponoj. Komenio estas konata ĉefe kiel granda pedagogo, sur kies principoj ankoraŭ hodiaŭ staras la moderna lernejsistemo kaj pedagogia scienco. Lia unua mondfama verko estis "Ĉeĥa didaktiko" (1632), pli poste reverkita en la latina sub la titolo "Didactica Magna" (legu didaktika magna) - Granda didaktiko. Vastan eĥon atingis la prilingvaj verkoj kaj lernolibroj de Komenio: "Janua Linguarum Reserata" (Pordego de la lingvoj malfermita, 1631), kaj "Orbis Pictus" (orbis piktus) - Mondo en bildoj, 1658. Siajn pedagogiajn verkojn Komenio eldonis en unu kolekto en Amsterdamo sub la titolo "Opera Didactica Omnia" (Ĉiuj didaktikaj verkoj, 1657). Dum sia tuta vivo Komenio okupiĝis pri la ideo de reeduko de la homa socio surbaze de morala kaj racia edukado de la homoj. Liaj porpacaj kaj humanismaj klopodoj, lia kredo pri la bona estonteco de la propra nacio kaj interfratiĝo de ĉiuj popoloj, respeguliĝis ankaŭ en liaj traktadoj kun politikaj reprezentantoj de la tiam Eŭropo. Tiun ĉi lian agadon rilatas unue en Britio verkita libro Via lucis (La vojo de la lumo), kies 19-a ĉapitro parolas pri



neceso de artefarita internacia lingvo kiel portanto de la lumo, kaj precipe la ampleksa kaj nefinita verko "Ĝenerala Konsulto pri la Rebonigo de la Homaj Aferoj", kies kvina parto "Panglottia" estas dediĉita al la problemo de universala lingvo. Li dividis la homan Junecon je kvar partoj po 6 jaroj (infano, knabo, adoleskanto, junulo), al kiuj apartenas respondaj lernejoj (patrina, elementa, gimnazio, universitato). En ĉiuj oni instruu ĉion, sed je diferencaj niveloj. Jam la infano lernas fundamentojn de la matematiko (kalkuli per fingroj), astronomio (suno, luno, steloj?, jarsezonoj), fiziko (granda, malgranda, varma, malvarma ktp.), moralo? (ĝentileco, ne mensogi) ktp. Liaj lernolibroj de lingvoj konsistis el mil frazoj, priskribantaj la mondon (ekz.: La steloj kvazaŭ lanternoj pendigitaj sur la firmamento prilumas la nokton kaj mezuras la tempon.) Li postulis, ke lernejon devige vizitu la tuta junularo, eĉ la malriĉa, eĉ la knabinoj (stulta patrino ne povas eduki saĝajn filojn). La universalan lingvon li postulis kiel portanton de la lumo de klereco al ĉiuj nacioj. Ĝi devas esti neŭtrala por ne vekii ĵaluzon de nacioj kaj multe pli facila ol la latino, kiun multaj ne kapablas ellerni. Li proponis aŭ simpligi la latinon aŭ krei lingvon tute novan. Klasikaĵo fariĝis lia alegoria satiro Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro (1623). Junulo volas trovi sian lokon en la mondo, kiu estas priskribita kiel urbo kun ses stratoj: tie loĝas familioj, metioj, sciencoj, religioj, administracio kaj nobelaro. La junulo esploras la stratojn kun siaj du akompanantoj Scivolemo kaj Iluzio, kiuj surnazigis al li okulvitrojn, tra kiuj ĉio aspektas bela, sed ili ne sidas bone sur lia nazo kaj li vidas el sub ili la veron. Kontrasto inter bela ŝajno kaj amara vero donas akran satiran sarkasmon. Post trarigardo de la mondo kun ĉiuj ĝiaj teruraĵoj la junulo fermiĝas en sia koro kun Kristo.

Pri Komenio aperis multaj esperantlingvaj artikoloj, broŝuroj kaj libroj. Ni citu kelkajn: Walter Hube: Jan Amos Komenský, pioniro de la internacia lingvo, Pĕřerov 1970. Oldřich Kníchal, Vlastimil Novobilský: Komenio kaj la internacia lingvo, ĈEA 1974. František Kožík: Lumo en tenebroj, ĈEA 1992 (romano pri Komenio kun aldonoj el liaj pedagogiaj libroj kaj el la satiro Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro). Seminario pri Komenio, ĈEA 1992.

Hejmpaĝo | Lastaj Ŝanĝoj | Preferoj | Uzu Unikodon
Redaktu tekston de la paĝo | Rigardu aliajn reviziojn
Laste redaktita April 14, 2002 7:25 am (malsamoj)
Serĉo:

Promeso de J. Chirac

La 15-an de aprilo 2002 Jacques Chirac [jak ŝirak], nuna prezidanto de Francio antaŭ sia reelektio, skribis jenon al Vincent Charlot, konata franca esperantisto:

Kara Sinjoro,

Vi bonvolis altiri mian atenton pri la problemoj de Esperanto, kaj mi dankas vin pro tio ĉar, kiel vi jam scias, temas pri afero pri kiu mi estas sincere favora.

Eĉ se pro kialoj kiujn vi facile komprenos, mi deziras antaŭ ĉio min dediĉi al la defendo de la francparolantaro, mi havas profundan simpatian por Esperanto kaj la humanista projekto kiu direktis ĝian kreigon kaj kiu pli ol iam ajn animas ĝiajn hodiaŭajn defendantojn.

Mi opinias miaflanke, ke la progresado de Esperanto, en la respekto de la kultura diverseco, kiu estas nedisigebla de ĝi, estus potenca faktoro de harmonio kaj kompreniĝo inter la popoloj.

Estas tute sendube ke, se la sorto de la urnoj estos al mi favora, mi submetos al la venonta registaro, kaj aparte al la ministro de la nacia edukado, la demandon pri ĝia inkludado kiel elekta lernobjekto en la abiturienta ekzameno, aparte pro la de-

ziroj esprimitaj fare de la gelernantoj kaj gepatroj, kaj pri la ebleco varbi sufiĉe da kompetentaj ekzamenantoj.

• Mi petas vin kredi, Kara Sinjoro, je la esprimo de miaj plej bonaj sentoj.

Plej kore. [manskribite]

Jacques Chirac
(laŭ RET-INFO)

Patrik Ouředník

Europeana, stručné dějiny dvacátého věku

La libro estis proklamita *Libro de la jaro 2001* (en Ĉeĥio) kaj priskribas koncize la historion de la 20-a jarcento. Paĝoj 86-88 parolas ankaŭ pri klopodoj enkonduki universalan lingvon kaj speciale Esperanton. Ŝajne negative ("komploto de esperantistoj"), sed la verko ne prijuĝas la aferojn. Ĝi nur konstatas, kio okazis, kion deklaradis esperantistoj, kiel reagis ekstermovadanoj, kiel reagis registaroj, ĉefe en totalismaj reĝimoj ktp. Estas bone, ke la aŭtoro konsideris la batalon por la universala lingvo tiom grava, ke li mencias ĝin en sia libro sur pli ol du paĝoj. Kompreneble li ne povis skribi, ke la afero sukcesis, ke la mondo entuziasme akceptis la ideon, ĉar bedaŭrinde la malo estas vero.

-mm-

Humphrey Tonkin inter ĉeĥaj esperantistoj

meze de aprilo vizitis prof. Humphrey Tonkin (Usono, eksprezidato kaj nuna vicprezidanto de UEA) Pragon partoprenante la konferencon de International Partnership for Service Learning (Internacia Partnereco pri Servado-Lernado), organizaĵo, kiu prizorgas programojn en diversaj landoj, kie studentoj povas samtempe studi en universitatoj kaj labori en volontula socia servado. Li estas vicprezidanto ne nur de UEA, sed ankaŭ de la menciita internacia organizaĵo.

Malgraŭ plenŝtopita programo li trovis tempon por renkontiĝi kun ĉeĥaj esperantistoj. Pro manko de tempo la informo estis disvastigita nur per ĈEA--retkomunikoj al tiuj, kiuj estas rete atingeblaj (kun peto ke ili plusendu la informon al siaj amikoj). Tamen, la kunvenon ĉeestis 26 ĉeĥaj samideanoj, ne nur el Prago kaj ne nur membroj de UEA, kio estas certe pozitiva trajto.

H. Tonkin prezentis la nunan situacion ene de UEA kaj respondis multajn demandojn pliajn, sed male li ankaŭ interesiĝis pri la loka Esperanto-movado. Estis kelkfoje menciita graveco de praktikaj aplikoj de Esperanto en diversaj sferoj kaj valoron de KAESToj tiurilate. Certe la ambaŭflanka informfluo estas ankaŭ ambaŭflanke utila kaj neniu el la ĉeestantoj bedaŭros la tempon dediĉitan al ĝi.

(Vidu fotojn en p. 57)

Esperanto ĉe altlernejo

La 16-an de majo mi partoprenis jubilean XX-an internacian kolokvon pri regado de la eduka procedo, orientita al la aktualaj problemoj de scienco, edukado, klerigado kaj disvolvo de krea pensado, organizita de Militista Altlernejo de Surtera Armeo en Vyškov. Temo de mia prelego: *Instruado de lingvoj per rekta metodo*. Kompreneble temis pri instruado de Esperanto kun informo pri projektoj de kursoj, kiujn mi havis aprobitaj de Lerneja ministerio - por baz- kaj mezlernejaj instruistoj (ĝi okazas nun) kaj por studentoj de nia Pedagogia fakultato de Masaryk Universitato en Brno de la 2-a kaj 3-a lernojaroj de la sekva semestro.

La kolokvon partoprenis eksterlandaj gastoj el Slovakio kaj Pollando (ili prelegis pole) kaj en la prelegokoleto estas publikigitaj kelkaj prelegoj el Litovio (angle). Mi volas proponi al organizantoj de la venontjara kolokvo prelegojn ankaŭ en Esperanto. Kiu antaŭvidas eblon partopreni, sciigu tion al mi, por ke mi iom eksciu pri la intereso kaj ĉu indas doni tiun proponon.

vojacek@jumbo.ped.muni.cz

<http://vojacek.virt.cz>

(la nove konstruataj ttt-paĝoj).

Monopolo de sciado

Ĝus aperis franclingva libro "La mise en place des momopoles du savoir" analizanta negativajn sekvojn de monopola uzado de la angla en internaciaj kontaktoj kaj monopolan aliron de anglalingvanoj al rezultoj de .scienca esplorado.

Internacia ekspozicio de infandeseĝnaĵoj



(Maarija Liliĉ, Serbio, 12 jaroj)

kun konkurso je la temo “Mia hejmo” okazis en Vyškov, Ĉeĥio, en la tagoj 23-a ĝis 31-a de marto 2002. Inaŭguro de la ekspozicio estis planata enkadre de RAVE-2, Renkontiĝo Amikeca en Vyškov Esperantista, kiu dank’ al neniuj aliĝinto ne okazis. Sed ĝi povis influi nur nombron da partoprenantoj dum la inaŭguro. Por la ekspozicio venis 153 desegnaĵoj el 11 landoj: Ĉeĥio, Slovakio, Hungario, Aŭstrio, Germanio, Litovio, Finnlando, Serbio, Bosnio kaj Hercegovino, Bulgario, Ukrainio. Ili estis instalitaj en antaŭsalono de kinejo en Sokoldomo sur 10 ambaŭflankaj paneloj (unu flanko estis titola), por fiksi ilin estis

necesaj du skatoletoj da pingloj. La inaŭguron partoprenis invitita kamearisto de loka kabla televido, en kies disaŭdigo estis prezentita la ekspozicio kun mallonga intervjuo kun prezidanto de la loka Esperantorondeto, ing. Josef Vojáček, bedaŭrinde nur sekvantan semajnon post fino de la ekspozicio. La bildojn, disdividitajn laŭ aĝo de iliaj aŭtoroj en tri kategoriojn, prijuĝis kaj vizitantoj kaj faka ĵurio kun la sekva rezulto:

ĝis 8 jaroj

1. Jurij Mazurenko, Kijev, Ukrainio, *Novjara fabelo*
 2. Jana Karl, Lamprechtshausen, Aŭstrio, *Estas vintro*
 3. Lucie Balínová, Kaznějov, Ĉeĥio, *Vesperknabeto*
- honora mencio:
- * Oksana Perepiĉka, Kijev, Ukrainio, *Novjara festo*
 - * Lorenz Karl, Lamprechtshausen, Aŭstrio, *Tio estas mia domo*
 - * anonime, Znojmo, Ĉeĥio, *Gepatroj promenaj, ni atendas fratineton*

8-14 jaroj

1. Ninga Mašejevuti, Zajeĉar, Serbio, *Mia vilaĝo*
1. Maarija Liliĉ, Zajeĉar, Serbio, *Mia vilaĝo*

2. Marina Strukevič, Paneveĵis, Litovio, *Urba parko*

3. Simas Brazlauskas, Majeikiai, Litovio, *Mia domo*

3. Hana Crhonková, Vyškov, Ĉeĥio, *Urbodoma turo*

honora mencio:

* Oleksandr Kaliničenko, Kijev, Ukrainio, *Pasko*

* Ivan Milivojevič, Zaječar, Serbio, *Gaja Novjarfesto*

14-18 jaroj

1. Milan Sodoma, Vyškov, Ĉeĥio, *Arboj en parko*

2. Tomas Korpavičius, Paneveĵis, Litovio, *Natura libereco*

3. Monika Kerianusaite, Paneveĵis, Litovio, *Inter la floroj*

La plej juna partoprenanto:

4 jaroj, Paulina Vâârâniemi, Vanhala, Finnlando, *Ĉe nia domo*

Tasko de la ĵurio estis tre malfacila. Pri tio atestas enskriboj en memorlibron: La bildoj estas belaj, ĉio estas belega, la ekspozicio tre plaĉas al ni, kaj simile. Tial en la mezaĝa kategorio estis aljuĝitaj po du unuaj kaj triaj lokoj kaj ankoraŭ en la du malpliagaj kategorioj estis aldonitaj tri kaj du honoraj mencioj. Ĉiuj partoprenantoj ricevis diplo-

mojn kaj ĉiuj premiitaj farbo-kraĵonojn aŭ akvofarbojn, kiuj estis aĉetitaj por mono el financa subteno de loka firmao Rostex. El ĝia komerca fako estis aldonitaj ankaŭ reklamobjektoj – globskribiloj, fermitoj kaj malfermitoj de boteloj, plastaj saketoj kaj informbroŝuro. Reciproke estas preparata varianto de ĝiaj TTT-paĝoj en Esperanto (sed ĝi estos preta nur somere – <http://www.rostex.cz>). En la sendaĵojn estis aldonitaj ankaŭ prospektoj de Vyškov-regiono kun almetita teksto en Esperanto.

Josef Vojáček



(Milan Sodoma, Ĉeĥio, 17 jaroj)

INFORMACE VÝBORU ČES

Výbor ČES se sešel 23. 3. 2002 v Poděbradech a sděluje následující informace:

* sjezd svazu se přesouvá o týden dříve, tedy na 15. - 17. 11. 2002, protože v původním termínu bude v Praze zasedat summit NATO a jsou předpokládány masové protesty a výtržnosti

* návrhy na úpravu stanov ČES přijímá Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha

* L. Karešová také zpracovává návrh koncepční práce a cílů našeho hnutí (viz diskusní článek str. 38, 39)

* vzhledem k tomu, že na internetu www.kuk.cz/cea jsou uvedeny u mnoha klubů a kroužků neplatné informace, rozhodl výbor uvést pouze seznam míst, kde je EK a adresu (případně telefon a e-mail) kontaktní osoby, která se zveřejněním **souhlasí** a je ochotna informace poskytovat. Vyzýváme proto kluby a kroužky, aby obratem sdělily tajemníkovi adresy těchto kontaktních osob.

* po delším snažení se podařilo zaregistrovat internetovou doménu www.esperanto.cz, dosud blokovanou spekulanty, aby brzy mohla podávat informace o našem hnutí

* upravuje se svazová technická knihovna do stavu, aby v brzké době - po několikaleté přestávce - mohla opět sloužit zájemcům

* Návrhy na kandidáty do výboru ČES zasílejte volební komisi (Janfk, Melichárková, Pištora) na adresu

předsedy: Kvido Janfk, Lidická 41, 787 01 Šumperk

* ČES vydává nepravdělně "ČEA-retkomunikoj", které rozesílá všem esperantistům v ČR, jejichž elektronickou adresu zná i některým samideánům v zahraničí, kteří projeví zájem. Jedná se většinou o aktuální informace, vždy stručné a zásadně bez příloh. Pokud máte svoji elektronickou adresu (a ČEA-retkomunikoj nedostáváte), zašlete ji na chrldle@kava-pech.cz a budete ihned do rozeslacího seznamu doplněni a tím dostávat nejaktuálnější informace.

NEVYJASNĚNÉ PLATBY

* Svaz obdržel tyto platby bez udání odesilatele: *členství v ČES* 28.1. (150Kč), 21.2. (150 Kč), 13.5. (25 Kč a 250 Kč), *paroliga kurso* 13.5. (1640 Kč a 820 Kč). Starto dostávají pouze ti, kdo mají zapláceno na letošní rok!!

Dosáhneme 1000 členů?

V souvislosti s přípravou sjezdu znovu proved'te kontrolu plateb u členů Vašeho EK, tak, abychom dosáhli alespoň 1000 platících členů. Nezapomeňte ani na své rodinné příslušníky, mezi kterými je také mnoho neplatících!!

Renkontiĝo en Ŝumperk

La 11-an de majo 2002 okazis en Ŝumperk tradicia renkontiĝo, kies partoprenantoj vizitis ortodoksan preĝejon kun ekspliko de la popo, muzeon kaj nove riparitan teatron, kiu antaŭ kelkaj jaroj elbrulis. Post sprita informado de Kvido Janfk, ĉiuj 32 partoprenantoj el 10 lokoj kaj kluboj raportis pri sia agado.

Helpu al Kronach-esperantistoj

En 2002 okazos Bavara Landa Ĝarden-Ekspozicio celanta purigi kaj beligi la urbon kaj en 2003 Kronach festos sian miljarigon. La lokaj samideanoj petas, ke esperantistoj de la tuta mondo sendu bildkarton kun Esperantlingva mesaĝo dezirante bonan sukceson por ambaŭ aranĝoj. Vi povas ankaŭ proponi, ke oni nomu iun straton laŭ Esperanto aŭ Zamenhof. Adreso: Stadt Kronach, Veranstaltungsbetrieb, Marktplatz 5, D-96317 Kronach, Germanio

Junuloj por Dresdeno

Oni serĉas gejunulojn inter 16-26 jaroj por partopreni junularan renkonton, verŝajne oktobre en Dresdeno. La eksterlandaj partoprenantoj nur pagas la vojaĝ-kostojn. Petu informojn ĉe la prezidanto Wolfram.Rohloff@epost.de.

Ne ĉiam okazas miraklaj aferoj kiel en Pirna: Instruisto por latina lingvo en gimnazio mem interesiĝis pri Esperanto, ĉar lernanto volis scii, ĉu ne ekzistas pli facila lingvo ol latina. La instruisto intertempe mem lernis Esperanton.

Norbert Karbe

Intervjuo en la slovaka televido!

La tutlanda slovaka informa TV-kanalo TA3 (simila al CNN) faris intervjuon kun Stano Marček, redaktoro de la revuo Esperanto, pri niaj lingvo kaj movado. Ĝi estis elsendata la 14-an de aprilo (85-a datreveno de la morto de L. L. Zamenhof), ĉiun duonhoron, dum la tuta tago, enkadre de la ripetataj TV-novaĵoj.

Papo benis en Esperanto

Dum Paska papa beno al la urbo kaj la mondo denove aŭdiĝis jam tradi-cie kvindeko da lingvoj inkluzive de Esperanto, sed ĉijare ankaŭ klare videblis grandaj afiŝoj, kunmetantaj la vorton Esperanto. La kamerao plurfoje tuŝis la surskribon, kiun tiel vidis miliardo da homoj.

Nova esperantista societo en Brno

En majo 2002 komencis agadi "Societo por la lingvo internacia Esperanto", kies strategio estas akiri ĉiujn siajn membrojn por aktiva organiza, kleriĝa kaj krea laboroj profite al la ideo de lingvo internacia, eniri la publikan medion, vekii intereson pri Esperanto pro ties specifaj ecoj, ne pro nuntempe nereala konkurenco-kapablo rilate al la angla lingvo. Krom tio ĝi planas turni sian atenton al regiona sudmoravia kunlaboro, kiu en ĉi-regiono ne ekzistas. Kontakto-ebloj: POŝTE: Sdružení MJE, J. Veselý, P.O.Box 77, 623 00 Brno. TELEFONE, FAKSE, PERSONE ĉiam lunde 10 - 12 horo: S. Barták, Vackova 88, 612 00 Brno; tel.+ fax: 05/49 24 74 27. E-POŝTE (e-mail): werne@tiscali.cz

Kiom da E-libroj jare?

Laŭ la ret-katalogo de la Internacia E-muzeo en Vieno: 1995 (285 libroj), 1996 (267), 1997 (283), 1998 (207), 1999 (213), 2000 (145), 2001 (85).

Skokovy 2002

Dum la 15-a Esperanta seminario okazis - apud kursoj - ankaŭ interesaj prelegoj, kiuj riĉigis aŭskultantojn pri ne ofte uzataj terminoj. Mi volas mencii la prelegon de inĝ. Jan Werner pri influo de konstruaĵoj, iliaj lokoj kaj materialoj je vivkondiĉoj de homoj. Eminente preparita prelego eĉ pro sia ne facila kaj faka enhavo kaŭzis grandan atentemon de aŭskultantoj kaj refreŝige brosis la terminojn, kiujn ni, nefakuloj, nur malofte aŭdas. Interesa estis ankaŭ faka prelego de inĝ. Margit Turková pri kuirado. Dankon al ambaŭ.

Milan Neuwirth



ADONIDO 2002

Jam okazis la 11-a renkontiĝo ADONIDO en tempo, kiam tiu ĉi belega, venena kaj protektita kreskaĵo floras (la nomo de la aranĝo restis kiel tradicia, malgraŭ la averto de d-ro Kavka, ke botanike la noŭmo ne estas tute ĝusta). Denove do kolektiĝis konfesantoj de belega naturo, bona amikeca rondo kaj ankaŭ de bona vino, nunjare en Vracov. La renkontiĝo komenciĝis vendrede denove per granda kegla

turniro, kiun ĉiuj partoprenintoj trapasis kun efektiva verovo. La venkintoj estis premiitaj per dolĉaj medaloj el marcipano, denove preparitaj de geedzoj Vyšinka en ilia produktejo.

Sabate la grupo de pli ol 30 personoj inkluzive de lernantoj, kiuj lernas Esperanton, ekmarŝis al la loko, kie la adonido kreskas. Dumvoje oni trarigardis belegan kastelon en Milotice kaj poste fine atingis la celon, kie la adonido montris sin en sia beleco. La tuta teritorio estis flavigita kaj tie la grupo ĝuis belegan naturon. Vespere poste ĉiuj vizitis ĉarman vinKelon, kie en bona humoro, amikeca etoso aŭskultis prelegon de Frant. Havlík pri kultivado kaj produktado de diversaj vitaj sortoj de vino. Dum la prelego ĉiuj povis konvinkiĝi, kiel unuopaj kulturvarioj bongustas. Dimanĉe matene en lernejo en Ra-tiškovice prezentis malgrandaj esperantistoj sian programon, kantojn, poemojn, fabelojn, simple tion, kion ili sub gvido de sia instruistino Jana Melichárková ellernis. Tio ĉi estis vere bonega finaĵo de tradicia printempa renkontiĝo. La renkontiĝon partoprenis unu eksterlanda gasto el Pollando.

Věra Podhradská

100-jara datreveno de la unua landa Esperanto-asocio en Hungario

Dum la tagoj de la 1-a ĝis la 3-a de marto okazis en Budapeŝto 32-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso kaj samtempe solenaĵo okaze de 100-jara datreveno de la unua landa asocio en Hungario Unuiĝo de la Hungaraj Esperant-istoj.

Tiun ĉi kongreson partoprenis ankaŭ reprezentantoj de najbaraj Esperanto-asocioj, nome el Aŭstrio, Kroatio, Pollando, Ukrainio kaj Ĉeĥio.

La kongreso havis tute alian programon, ol estas kutima ĉe ni. La programo konsistis el diversaj fakaj prelegoj, parte en Esperanto kaj parte en la hungara lingvo. La prelegoj estis dediĉitaj al jenaj temoj: Hungara lingvostrategio, Ĉu estas bezonata komuna lingvo en EU, Fragmentoj el historio de hungara Esperantista movado, Hungaraj esperantlingvaj periodaĵoj, Kontribuo de hungaraj esperantistoj al la E-literaturo k.s.

Kompreneble, ke ankaŭ okazis Movada forumo kun eksterlandaj

gastoj, kie ĉiuj reprezentantoj rakontis pri movado en siaj landoj. Samtempe okazis Pedagogiaj tagoj, sed hungarlingve, ĉar dediĉitaj ĉefe al hungaroj, por ke oni povu alproksimigi la problemojn, kiuj dependas de pedagogia agado en Hungario.

Vespere okazis balo dediĉita al la 10-a naskiĝtago de Eventoj.

Dimanĉe matene la kongresanoj partoprenis florkronadon de tombo de Julio Baghy, kiu estas entombigita inter famaj hungaraj historiaj, kulturaj kaj politikaj eminentuloj. Profesia gvidanto, hungara aktoro, konatigis ĉiujn ne nur kun vivo kaj agado de Julio Baghy, sed ankaŭ kun plej famaj hungaraj eminentuloj, deklamante el iliaj verkoj. Kvankam ĉio estis en la hungara lingvo, tamen al eksterlandanoj bele sonis la poemoj kaj paroladoj, la enhavoj estis tradukitaj en Esperanton.

Speciala danko apartenas al Oskár Princz, ĝenerala sekretario de HEA, kaj Szandor Jakab, kiuj ofereme dediĉis sin al eksterlandaj gastoj kaj eluzis ĉiun eblecon por montri al ili la belegan urbon Budapeŝt ĉiam, kiam estis iom da libera tempo, eĉ malfrue vespere.

*Věra Podhradská
Jana Melichárková*



Al la paĝo 59: niaj reprezentantoj antaŭ la kongresejo



El la vizito de Humphrey Tonkin inter la ĉeĥaj esperantistoj (legu artikolon en p. 53)

Esperanto-klubo
en Ústí nad Labem - Ĉeĥio
aranĝas

la 15-an Internacian Kulturan Festivalon

semajnfine de la 4-a ĝis la 6-a de
oktobro 2002

dediĉota jam tradicie al la rememoro
de elstaraj ĉeĥaj Esperantaj verkistoj
s-roj **Jiří Kořínek** el Ústí n. L. kaj
d-ro Tomáš Pumpr el Prago.

Programo estas distra:

vendrede – interkona vespero,

sabate – prelega matineo, vespere –
koncerto de oper- kaj operet-arioj
kaj klasikaj kantoj (prezentos artistoj
el Ústí n. L. kaj el Prago)

dimanĉe – ekskurso al la kastelo
Velké Březno

**Plej malmultekosta E-aranĝo en
Eŭropo!**

Detalajn informojn petu je la adreso:
S-ro Miroslav Smyčka, Kojetická
str. 90, CZ-400 03 Ústí nad Labem
(Ĉeĥio),

aŭ pere de tel. n-ro: por enlanda-
noj: 047-553 24 17, por eksterlan-
danoj: 420-47-553 24 17.

Lingvaj ludoj kaj enigmoj (10)

Solvoj de la rimludoj el la antaŭa numero:

17. *sonĝo, reĝo*

18. *somero, vespero, rivero, bariero*

Inter esperantistoj estas konata la ludo nomata "vorta futbalo". La partoprenantoj unu post la alia rondire diras vorton, kiu komenciĝas per la lasta silabo de la vorto, kiun diris la antaŭa partoprenanto. Ekzemple: nova - vana - nacio - okazo - zono - noto - tono ... Se oni ludas ĝin konkurse, unu poenton perdas tiu, kiu ne scipovas elpensi ĉenan vorton en difinita tempospaco kaj la ludon interrompas. La sekvanta partoprenanto malfermas la ludon per nova vorto. En unu ĉeno ne povas ripetigi unu vorto dufoje.

Sur tiu ĉi ludo estas bazita la enigmo, kiun ni povas nomi

ĈENO

Tasko de solvantoj de tiu ĉi enigmo estas diveni serion (minimume tion) da vortoj, kiuj estas sinsekve ĉenitaj per la samaj lastaj kaj unuaj silaboj. La divenotaj vortoj formas kontinuan tekst(et)on kaj ili estas en propono de la enigmo aluditaj okulfrape per

sinonimoj aŭ preskaŭsinonimoj. Jen la montraĵoj:

Da testoj estis grandaj kvantoj kaj super ili longe ĝibis lektoro, **kiu havas devon kontroli jenon**, kion skribis dum ekzameno gelernantoj.

Solvo: kies estas tasko korekti tion.

Misa atmosfer' en balo

celis la kulminon,

kiam **orhara virino**

ridindigis sian koleginon.

Solvo: blonda damo mokis

Dum prepar' de kluba festo

iĝis la diskut' ekscita:

kiu **membro skribos trinkprologon**

de l' urbestro invitita.

Solvo: ano notos toston

Jen du taskaj ĉenoj:

19.

Li ĉiun vodkon eltrinkis,

sed gasto volas ripeton,

la **ĉefo elserĉis brandon**

kaj verŝis plenan glaseton.

20.

Min tre surprizis respond' de l' amiko,

kiam kritikis mi lin en sincero.

La kamarado eksplode respondis,

ke ĝi ne estas ja mia afero.

Josef Cink

Ni kondolencas

* la 23-an de marto 2002 forpasis en la aĝo de 82 jaroj s-ino **Hilda Kořínková** el Ústí nad Labem. Naskita 27.4.1920 en Brno kiel Hilda Urbanová, en 1938 ŝi edziniĝis al Jiří Kořínek, fama tradukmajstro, forpasinta en 1989. En 1940 naskiĝis filino Věra, kiu edziniĝis al Vlastimil Novobilský en Ústí n. L. En 1964 tien translokiĝis ankaŭ la geedzoj Kořínek.

* post longa suferado la 30-an de marto 2002 forpasis **ing. Václav Pecák**, kiu enĉehiĝis la *Novan realismon* de B. Vogelmann (kun M. Malovec)

* la 3-an de majo 2002 mortis s-anino **Oldřiška Müllerová**, multjara esperantistino el Šumperk, kiu estis vigla ĝis siaj 96-jaroj.

Korekto:

Milan Zvara forpasis 30. 1. 2002 (ne 2001) - mi pardonpetas pro eraro, kiun neniu rimarkis dum korektado (Starto 1/2002, p. 24). *Red.*

Foriris Thor Heyerdahl

La 18-an de aprilo 2002 forpasis mond-fama norvega arkeologo, etnografo kaj zoologo (nask. 1914), kiu en 1947 pruvis per sia kuraĝa navigado sur floso Kon-Tiki el Peruo al Tahitio, ke la polinezianoj povas deveni el Ameriko. Esperantistoj rajtas fieri, ke jam en 1951 aperis esperantlingva traduko de lia glora libro (kaj de tie slovagitita).

Kiu veturos al Verona?

Estimataj amikoj, ni estas 4 esperantistinoj, kiuj intencas partopreni EEU-kongreson en itala Verona de la 23-a ĝis 28-a de aŭgusto 2002. Ni estas pretaj akcepti ĉaj bone pagi ŝoforon kun aŭto, plu ni eĉ havas pagitan kotizon por li/ŝi de pasinta jaro, ĉar ni estis origine 5.

Kontaktu: Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, 293 01 Mladá Boleslav

Kiu helpos al Brazilano?

Mi estas esperantisto kaj spiritisto kaj mi jam vizitis vian belan landon pasintjare. Ĉijare, en oktobro, mi planas denove viziti vian landon kaj mia intereso estas esplori la vivon de la martiro Jan Hus. Mi demandas, ĉu iu povas helpi min dum mia vizito, ĉar mi ne scipovas la ĉeĥan lingvon, sekve la tasko estas por mi tre malfacila. Plaĉus al mi viziti ne nur Pragon, sed ankaŭ kie naskiĝis kaj vivis la majstro.

Mi ankaŭ povas prelegi pri spiritismo, se iu povas prizorgi ĉambron kaj interpretiston, por traduki min.

Clovis Alves Portes, R. Oswaldo Cruz, 29, 35162-396 - Ipatinga - MG Brazilo, clovisportes@ig.com.br, tel: 031 3821 6413



KALENDARO 2002

18.5. Esperanto-Arbo en Olomouc

8.6. Renkonto en Herbortice

7. - 9.6. Paroliga kurso kaj asociaj ekzamenoj (Poděbrady)

11.-16.6. EKOTUR - Ekoturisma renkontiĝo en Kvilda (Šumava)

14.-16.6. Esperanto en ripozejo Máj Plasy

50-a Somera Esperanto-Tendaro,

Lančov:

30.6.- 13.7. I. etapo

14.7.- 27.7. II. etapo

28.7.-10.8. III. etapo

10.8. solena viciĝo okaze de la 50-jariĝo

11.8.-17.8. ripoz-semajno (rekreaĉni týden)

20.7.-27.7. 55-a IKUE-kongreso - Kroměříž

27.7.-3.8. Postkongresa renkonto en Dub n.M

1. 8.- 16.8. 87-a UK en Fortaleza Brazilo

(flugkaravano de KAVA-PECH)

9.8-11.8. 5-a renkontiĝo de eksjunularo

11.-21.8. Nekvasovy

23.8.-28.8. 5-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso - Verona (komuna karavano ne estos organizita)

27.-29.9. IKUE-renkonto en Želiv

9. 9.- 14.9. 2-a IBIRE Dobřichovice (biciklado)

14.9.-21.9. 4-a AEH-IKEH kongreso de handikapitaj esperantistoj - Janské Lázně

4.-6.10. 15-a Internacia kultura festivalo Ústí

8.11.-10.11. Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), Elektronikaj rimedoj - sub aŭspicio de UEA - Dobřichovice

15.-17.11. 10-a ĈEA Kongreso - 100-jara jubileo de EK Prago

7.12. 21-a Ĉeĥa-Saksa Tago en Ústí n. L

Jak platit svazu

Nejlevnější způsob platby pro Vás i pro svaz je přímá platba u pokladny v kterékoliv pobočce Komerční banky. Vyplňte pokladní složenku (jsou v pokladně k dispozici) pečlivě ve všech kolonkách (viz

vzor Starto 2/2001, str.67) - tedy: měna účtu: Kč, č. účtu: 3330-021/0100, měna hotovosti: Kč, částka: slovy kolik platíte, jméno a příjmení, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně (EK Velim) do kolonky *Vklad jménem* a pošlete tajemníkovi jmenný seznam. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo v. inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379. Seznam čísel:

06940 ČES

06941 UEA

06942 předplatné Starta bez členství

06943 dary ČES

50100 sekce mládeže

50200 sekce železničářů

50400 sekce pedagogická

50401 písemný kurs začátečníci

50402 písemný kurs pokročilí

50403 členství ILEI

50404 Paroliga kurso

50405 svazové zkoušky

50500 sekce přátel SAT

50600 sekce šachistů EŠLI

50700 sekce sběratelů

50800 sekce nevidomých LIBE

50900 sekce zdravotníků UMEA

51000 sekce křesť. esp. KELI

51100 sekce katol. esp. IKUE

70100 komise pro tisk a inf.

80200 ediční fond

80300 propagace v tisku

80400 fond Tilio

Pokud jste poukázali platbu a nejste si jisti, zda jste řádně vyplnili své jméno, napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme řadu neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.

Periodikum Českého esperantského svazu (32. ročník)

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@clavis.cz;
www.clavis.cz/starto

Členská evidence a změny adres:
Pavel Polnický, ČES

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
(32-a jarkolekto)

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ
rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 9 eŭroj
(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: starto@clavis.cz;

www.clavis.cz/starto
Presis: OPATISK Opava

ISSN 1212-009X



El la ekspozicio de infandeseĝnaĵoj en
Vyškov

